Jarkunveno de Grupo Esperantista de Trondheim, 23an de februaro 2010 ĉe Arne Olav Mjøen, Alf Godagers v. 7

1. Aprobo de la kunvoko

La kunvoko aprobiĝis.

2. Malfermo de la jarkunveno

Prezidanto de GET, Kjell Heggvold Ullestad, malfermis la jarkunvenon.

3. Aprobo de la tagordo

La jarkunveno aprobis la tagordon.

4. Elekto de kunvena prezidanto, raportanto kaj 2 subskribontoj de la protokolo

Kjell Heggvold Ullestad elektiĝis kiel kunvena prezidanto. Kiel raportanton oni elektis Jardar Eggesbø Abrahamsen. La protokolon subskribos Judith Parelie Abrahamsen kaj Arne Olav Mjøen.

5. Jarraporto 2009

Oni laŭtlegis la jarraporton, faris kelkajn malgrandajn modifojn kaj fine aprobis ĝin.

6. Jarkalkulo 2009

La ĝisnuna kasisto (Ulf Stenhaug) prezentis la jarkalkulon. La kasisto ne havas la paperan jaran konteltiron de Handelsbanken, ĉar ankoraŭ la inta kasisto Anne Karin Bondhus formale disponas la konton, pro tio ke GET ĝis nun ne havis organizan numeron. Ŝi tamen komunikis la nombrojn al la kluba kasisto. Ni ankaŭ ne havas dokumenton pri la sumo kiun la studasocio Populus donu al ni. La revizoro tamen akceptis la jarkalkulon. La jarkunveno aprobis la jarkalkulon.

La ĝisnuna kasisto prezentis la budĝeton por 2010. La jarkunveno decidis ne trakti ĝin, sed lasi la decidojn al la estraro.

7. Elektoj

Prezidanto:	Torstein Kvakland (nova)
Sekretario:	Jardar Eggesbø Abrahamsen (reelekto)
Kasisto:	Ulf Stenhaug (reelekto)
Estrarano:	Herman Ranes (reelekto)
Anstataŭanto:	Christian Fossen (reelekto)

Revizoro: Jørgen Åldstedt (reelekto)
Vicrevizoro: Arne Olav Mjøen (reelekto)
Kunordiganto de la vortara projekto: Herman Ranes (reelekto)
Responsulo pri la biblioteko: Herman Ranes (reelekto)
Responsulo pri la arĥivo: Torstein Kvakland (reelekto)
Elekta komitato: Jørgen Åldstedt (reelekto) kaj Arne Olav Mjøen (reelekto)

8. Envenintaj proponoj

Neniu propono envenis.

9. Fermo de la kunveno

La nova prezidanto de GET donis paroladeton kaj fermis la jarkunvenon.

Post la jarkunveno okazis kafklaĉo.
Ĉeestis 9.

Raportis: Jardar Eggesbø Abrahamsen

Subskribis: Judith Parelie Abrahamsen Arne Olav Mjøen